Laŭzana Esperanto-Societo
Oktobro 2021 - n-ro 08

# Laŭzana informilo

*Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe :* ***eventaservo.org/o/LES***

## *Venontaj kunsidoj:*

- Lu, la 1an de novembro *David prelegos*
- Sa, la 18an de decembro *Zamenhofa Festo*
- Lu, la 10an de januaro *Decidota*
- Lu, la 7an de februaro *Decidota*

## Lunde, la 4an de oktobro 2021,

**je le 20a ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier en Montreux**

## Karlota Blanc Maillard prelegos :

## *«Kiam, kial, kiel mi lernis esperanton?»*

### Rememoro

verkita de David Buhlmann - 08.1987

Estis post la fino de la Varsovia kongreso, kie mi retrovis mian amikinon Zofia el Krakovo; ŝi partoprenis la kongreson kun sia filo Marek.

Tiun tagon ŝi invitis min manĝi ĉe la baptopatrino de Marek por memorigi la ribelon de Varsovianoj en aŭgusto 1944.

Post la tagmanĝo ŝi proponis al mi viziti la ĉefan tombejon de la urbo, kie situas memorigo ĉe la monumento de la forpasintoj de *Katin* kaj aliaj herooj.

Kiam ni alvenis, la ĉielo komencis nigriĝi kaj mi rimarkis tombon, kie du skoltoj ambaŭflanke staris silente; mi ne vere komprenis kial.

Alvenante al la monumento de *Katin* - kiu estis ĉirkaŭita de nombra ĉeestantaro kaj sur ĝi staris etaj kandeloj - la ĉielo komencis « plori » regule sed ne forte.

La etoso estis emocia pro kompleta hommuteco kaj silento sub pluvo, kiu daŭre kaj pli forte falis. La estigintaj kandeletoj estis silente anstataŭigitaj de novaj. Ni restis senmove tute malsekaj.

Vere memorinda travivaĵo.

DB


## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28

facebook.com/esperantolausanne
youtube.com …*esperantolausanne*
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


**Komitato 2020**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Nia programo aperas en** https://eventaservo.org/o/LES

### Babilada Rondo

**ve, la 22an de oktobro je la 19a**
ĉe Francisko Randin
Vallombreuse 14, Laŭzano
021 647 29 28 / 076 411 14 55

Francisko parolas pri **SARS-CoV-2 alnomata Krona Viruso 19**

Mi bonŝancas esti kapabla krei miajn proprajn antikorpojn ... sen ajna helpo de Pfizer aŭ Moderna. Mi forte suspektas, ke kontaĝa vakcinit(in)o ofertis al mi ĉi tiun donacaĉon komence de aŭgusto.

Mia historio: Alcele posedi «Macron-an paspermeson» por iri al Mulhouse - dimanĉe matene la 8an - mi iris al *Beaulieu* sperti antigenan teston. Surprizo de la flegistino, kiu anoncas al mi, ke mi « Covidpozitivas sen simptomoj ». Rapide PCR-teston kaj tujan izoladon hejme (Viviane ferias du semajnojn en Valezo).

La kantona kuracisto telefone konfirmas al mi, ke mia Covid-o estas forta kaj tiel mi kreos bonegajn antikorpojn. Post unu semajno da izoleco aŭtotesto anoncas mian resaniĝon; mi do ricevas la QR-kodon kiel elitaj homoj. De tiam, mi ne plu partoprenas la renegatgrupon.

Mia ĉiutaga imunsekreto: vitaminoj C kaj D, omega 3, magnezio, zinko sed ĉefe 10 gutoj de «mia kara *Propolis*» ofertita de la abeloj al la homoj.

Nia resaniganta klubo kreskas. Mi ŝatus bonvenigi ĉi tie Knud kaj Marie-Antoinette Sunier, kiuj eliras el sia izoliteco.

Tiu rakonto estas en libreto de 5 historioj verkitaj de 13 el niaj membroj.

# LA FANTOMOJ DE LA LAGO

*versio B, parto 4*

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | 1 | | | 5 | | 6 | |
| | | 6 | 3 | | | 8 | | |
| | | | 2 | | | 5 | | 7 |
| 3 | | | | | 2 | | | |
| | 2 | | | | | 4 | | |
| 4 | | 8 | | 1 | | | | |
| 1 | | | | 6 | 3 | | 4 | 9 |
| 8 | | | | | | | | |
| | | 9 | | | | | 5 | |




| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | 7 | | 4 | 8 | | | 9 | 5 |
| | | | 9 | | | | | |
| 4 | | 8 | | 1 | 2 | | | |
| | 8 | 1 | | | | | 6 | |
| | | | | | | | | |
| 2 | 4 | | | | 5 | | | 7 |
| | | | | | | | 5 | 2 |
| | | 3 | | 5 | 8 | 1 | | |
| | | | 7 | | 9 | | | |




Ĉi-vespere Arturo proponas akompani nin ĉe Dieter, al kiu li prezentas nin dirante: *«Jen Maksimo kaj Julia, tre bonaj amikoj kanadaj de Ernesto.»* La restoraciestro rekonas nin kiel klientoj. Li komencas rakonti, kiel ekde tri monatoj li serĉadas sian partneron: *«Finfine mi retrovis la spuron de Ernesto en kliniko de Evian. Oni ne permesis al mi renkonti la amneziulon, tamen mi bonŝance estis akceptita de lia kuracistino, al kiu mi montris la pasporton de mia partnero. La doktorino proponas, ke mi revenos post unu semajno por rehejmenigi lin, ĉar ŝi pensas, ke tio estus bona por lia terapio. Ŝi preparos por mi la diversajn elirpaperojn kaj liajn aferojn. Mi do iros morgaŭ, ĉar estas la ferma tago de la restoracio. Ĉu vi deziras akompani min?»*

Dieter, Arturo, Maksimo, Julia kaj mi rendevuas en Uŝi, al la enŝipeja domo, por preni tiketojn al Evian. La kebeka paro plezuriĝas trairi la lagon kaj viziti urbon en Francio. Maksimo tute ekscitiĝas ankaŭ pri la penso revidi sian amikon. Ni ne multe parolas dum la vojaĝo, iomete angoretaj pro nekonaĵo, kiu atendas nin.

Ni alvenas al la kliniko kaj decidas atendi en la apuda trinkejo. Nur Dieter sole iras serĉi Erneston. Post preskaŭ unu horo ili ambaŭ aliras al ni. Ernesto hezite marŝas al nia direkto. Ni ekstariĝas kaj salutas lin. Li alproksimiĝas rigardante ĉiun el ni unu post la alia. Li haltas sian movon vidalvide al Maksimo, kiu diras: *«Saluton Ernesto, kiel vi fartas?» «Bone … kaj vi … Maksimo?»* respondas la amneziulo ridetante. Tuj la ĝojo kaj la emocio kaptas nin ĉiujn.

La ŝipa reira vojaĝo okazas tute feliĉe. Dieter rakontas: *«Antaŭ iom da tempo, kiam mi eniris la ĉambron de Ernesto, li tuj rekonis min kaj ĵetiĝis en miajn brakojn.»* Tiam Arturo demandas al Ernesto: *«Ĉu vi scias, kiu mi estas?» «Via vizaĝo ne estas nekonata de mi, sed mi ne plu povas rememori vian nomon.»* Arturo rakontas: *«Vi loĝis miahejme antaŭ aĉeti la restoracion kun Dieter.»* Atentigaj ni konstatas, ke la fizionomio de Ernesto lumiĝas aŭskultante lian amikon klarigi pri tiu tempo. Maksimo prezentas sian edzinon, Julia, al la eksamneziulo. Tamen en li neniu memoraĵo restas pri lia akcidento.

Alvenante en Svislandon ni ĉiuj konsentas iri kune al la policejo por anonci la revenon de "nia malaperulo". La policisto, baze de lia pasporto, plenumas formularojn kaj diras: *«Bonvenon en Svislando.»*

Dieter proponas silentigi pri la reveno de Ernesto dum kelkaj tagoj. Cetere li dungis kuirhelpanton ĝis la fino de la monato; li do lasos sian kunpartneron libera, por ke li iom post iom retrovu siajn gvidmarkojn.

Ĵaŭde vespere Dieter deziras organizi, en sia restoracio "Ĉe La Du Amikoj", festeton pro la reveno de Ernesto. La kuiristo anoncas: *«Escepte ni lasos la restoracion fermita al la publiko kaj ni restos inter ni ses … amikoj.»*

Dieter preparas grandiozan menuon kaj antaŭ la manĝado ekparolas: *«Gekaraj. Ni festas ĉi tie la revenon … la renaskiĝon de Ernesto. Dank'al Dio li preskaŭ tute retrovas sian memoron escepte la momentojn de la dramo. Finfine ni neniam scios, kio enboate okazis. Ne gravas. Ni lasu kun ilia sekreto la fantomojn de la lago. Je via sano!»*

## Intervjuo de Pierre Boizot, membro kaj bibliotekisto de LES



(Fare de Francisko)

*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Dum vintra nokto de 1956 mi naskiĝis en Grenoble kaj tie studis statistikojn. Poste mi kelkjare laboris ĉie en Francio. Mi modifis iomete mian metion laborante kiel programisto independanta. En 2006, svisa firmao proponis al mi ŝancon veni en tiun regionon. Nun mi emeritas sed daŭrigas kiel komputilisto volontula tra asocio, kiu subtenas tiujn, kiuj bezonas helpon.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**Mi delonge aŭdis pri ĝi sed nur en 2019, kiam ni preparis vojaĝon, mia edzino proponis al mi studi la hispanan por faciligi niajn movojn enlanden. Mi preferís interesiĝi al internacia lingvo kaj serĉis informojn enreten pri esperanto.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**En decembro 2019, mi sekvis la e-kursojn ĝisfine. Tuj mi kontaktis kaj membriĝis al LES. Kvar monatojn poste mi komencis studi esperanton pere de *Duolingo* angla kaj poste franca; hodiaŭ mi jam sekvis 500 kursojn.**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**La personoj pensas, ke mi fidelas al mi kaj ili ne miras.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Ne … neniu.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Mi ne ankoraŭ partoprenis UK-on. Tamen mi kelkfoje iris al la studsabato en la Chaux-de-Fonds. Mi esperas iri al Torino en 2023.**